

# le monde de l'ESPERANTO

591  
numéro  
15 avril 2015



**DOSSIER**

## Espéranto, langue de la diversité

PAGE 6

**ACTUALITÉS**

L'Espéranto et l'Unesco : 60 ans  
d'efforts communs

PAGE 4

- L'actualité de l'espéranto
- La vie de l'association
- Culture et voyages

4,50 €

espéranto  
France

## éditorial • frontartikolo

**D**ans ce numéro vous trouverez des articles ayant trait à des activités en espéranto dans diverses parties du monde. Rencontre au Togo, voyage au Népal, cours à l'université du Costa-Rica, intervention d'une Coréenne pour l'enseignement de l'espéranto en France, festival international en Allemagne, festival du film en Chine, exposition de poupées au Japon. Nous aurions pu remplir un numéro double en relatant toutes les autres rencontres espérantophones et toutes les initiatives récemment prises dans le monde entier, Australie, Indonésie, Malaisie, Philippines, Brésil, Colombie, Cuba, Nicaragua, Pérou, Canada, Etats-Unis, Corée, Iran, Israël, Pakistan, Taiwan, Thaïlande, Vietnam, Bénin, Maroc, Tunisie et la plupart des pays d'Europe.

Des amis de l'espéranto sont morts dans l'attentat contre Charlie Hebdo, en particulier Charb et Cabu qui avaient signé la pétition pour l'espéranto comme langue à option au bac. Nous ne pouvons que condamner tout acte portant atteinte à la liberté d'expression, droit fondamental.

N'oublions pas que certains régimes ont considéré l'espéranto comme langue dangereuse... et l'ont interdite. Dans le précédent numéro nous évoquions la lettre ouverte aux diplomates et des discours du Dr Zamenhof. Malheureusement ces textes sont toujours actuels, trop actuels.

Claude Nourmont, rédacteur en chef

**E**n tiu ĉi numero vi trovos artikolojn kiuj traktas esperantajn aktivaĵojn en diversaj partoj de la mondo. Renkontiĝo en Togolando, vojaĝo en Nepalo, kurso en la universitato de Kostariko, interveno de koreino por instrui Esperanton en Francio, Internacia Festivalo en Germanio, pup-eks-pozicio en Japanio. Ni povintus plenigi tutan duoblan numeron raportante pri ĉiuj aliaj esperantaj renkontiĝoj kaj pri ĉiuj lastatempaj iniciatoj tra la mondo, Aŭstralio, Indonezio, Malajzio, Filipinoj, Brazilo, Kolombio, Kubo, Nikaragvo, Peruo, Kanado, Usono, Irano, Israelo, Koreio, Pakistano, Tajlando, Tajvano, Vietnamio, Benino, Maroko, Tunizio kaj preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo. Amikoj de Esperanto forpasis dum la atenco kontraŭ Charlie Hebdo, aparte Charb kaj Cabu, kiuj subskribis la peticion por Esperanto kiel elektebla lingvo ĉe la abituriento. Ni povas nur kondamni ĉian agon kontraŭ la libero esprimiĝi, fundamenta rajto. Ni ne forgesu, ke iuj reĝimoj konsideris Esperanton danĝera lingvo... kaj ĝin malpermesis. En la antaŭa numero ni elvokis la malferman leteron al la diplomatoj kaj iujn paroladojn de Dro Zamenhof. Bedaŭrinde tiuj tekstoj plu estas aktualaj, tro aktualaj.

Claude Nourmont, ĉefredaktoro



## ACTUALITES

► Une victoire historique p.4

## DOSSIER

► Bunta Esperantujo p.6

## ASOCIA VIVO

► Ni ĉiam pretas diri jes por partopreni en kongres' p.10

## CULTURE

► La Kompanoj, plian gigan-tan paŝon al Lillo p.15

## VOYAGE

► La treko de la reĝinoj p.18

Revue d'espéranto fondée en 1908, éditée par Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris

Tél. 09 51 77 18 33 - [www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org)

Tout (sauf réd.): [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)

Trimestriel : 4 n° par an - Dépôt légal à parution

**Tous droits de reproduction réservés**

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.

Directeur de publication : A. Rousseau

**Rédacteur en chef** : Claude Nourmont

[mondo@esperanto-france.org](mailto:mondo@esperanto-france.org)

Envoi des articles 1 mois avant parution

Ont aussi participé ou contribué à ce numéro :

A. Adjévi, M. Arnaud, F. Bartsch, M. Fettes, B. Flochon, Goja (Zhang Ping), A. Jausions, K. Kováts, E. Le Dru, A. Leoni, J. Le Puil, D. Loison, A. Lowenstein, A. Lucas, E. Mas, Etsuo Miyoshi, F. Morandau, B. Moon, L. Patas d'Illiers, A. Songanta, R. Triolle.

Crédits photographiques :

A. Adjévi, M. Arnaud, J. Dumoulin, F. Lo Jacomo, K. Kováts, E. Le Dru, Etsuo Miyoshi, A. Songanta. Alternatiba, B. Flochon, B. Moon.

Publicité/annonces : à la rédaction

Abonnement : 1 an (4 n°) : 18€ à

Espéranto-France

Impression : IPPAC, Langres (52),

membre de Imprim'vert

Imprimé en avril 2015

Mise en page : Bruno Flochon

ISSN 1628-1942



Ce dessin est reconnaissable par certains téléphones mobiles et permet de se connecter au site internet indiqué par le code.

Le code ci-dessous indique le site d'Espéranto-France.



## Une victoire historique

**31** octobre 2014, voici une date qui va sans doute figurer en bonne place dans les futurs livres d'histoire de l'espéranto. Ce jour-là, la Pologne a pris la décision officielle de faire entrer l'espéranto dans son patrimoine culturel.

Madame Małgorzata Omilanowska, ministre polonaise de la culture et du patrimoine national, l'a annoncé en ces termes : « la langue espéranto, en tant que support de la culture espérantophone, entre dans la liste nationale du patrimoine culturel immatériel. » Et elle a ajouté qu'elle félicitait les espérantistes de « conserver à destination des générations à venir cette extraordinaire et admirable tradition. »

Qu'est-ce qui a permis cette belle victoire ? L'action conjuguée et persévérante de nombreux espérantistes polonais. Des personnes, comme Kazimierz Krzyżak ou le sénateur Edmund Wittbrodt. Le groupe parlementaire en faveur de l'espéranto, fondé par Edmund Wittbrodt. Le parti polonais Europe Démocratie Espéranto. De nombreuses associations espérantistes polonaises. Sans oublier les 1.600 signataires de la pétition.

Cet événement n'est pas isolé, il s'inscrit dans une continuité. Depuis longtemps, en Pologne on s'active à promouvoir l'espéranto auprès de la classe politique et du public. Nous avons parlé du forum économique de Krynica. Une exposition sur l'espéranto a été présentée au Sénat et circule aujourd'hui dans le pays. Le groupe parlementaire en faveur de l'espéranto organisera une grande réunion, avec les présidents des associations espérantistes régionales, pour annoncer solennellement l'événement. Ils l'utiliseront dans un plan d'action pour diffuser l'espéranto.

Pourquoi cet événement est-il si important ? Parce qu'il s'agit d'une reconnaissance officielle de la valeur de l'espéranto par un état souverain. Parce qu'il peut ouvrir la voie à d'autres reconnaissances, qui

elles aussi augmenteront la visibilité de l'espéranto et favoriseront sa diffusion. Un exemple, la Pologne a ratifié la charte européenne des langues minoritaires et régionales. Elle a déjà reconnu une quinzaine de langues et pourrait ajouter l'espéranto. En tant que langue minoritaire d'un Etat, l'espéranto bénéficierait alors d'importants avantages en Europe.

Autre exemple, d'autres pays peuvent eux aussi inscrire l'espéranto dans leur patrimoine national culturel. Si plusieurs pays le lui proposent, l'UNESCO peut accepter d'inscrire l'espéranto dans la liste du patrimoine culturel immatériel de l'humanité.

Laure Patas d'Ilhiers



### 10 décembre : Journée Internationale des Droits de l'Homme

## Déclaration de Mark Fettes « L'Espéranto et l'Unesco :

**A**ujourd'hui, à l'occasion de la Journée internationale des Droits de l'Homme, le mouvement pour la langue internationale espéranto célèbre le 60<sup>ème</sup> anniversaire de sa coopération avec l'Unesco, la branche des Nations Unies pour l'éducation, la science et la culture.

L'espéranto a été lancé il y a 127 ans, en 1887, afin de faciliter la tolérance, la coopération et l'intercompréhension entre les hommes de tous les pays. Par la diffusion d'une langue librement utilis-

ble qui appartient communément à tous les peuples, les espérantistes ont depuis ces temps œuvré à la construction d'un monde uni, pacifique, juste et prospère. De son côté l'Unesco est né après les années destructrices de la seconde guerre mondiale, où il devint évident qu'une paix véritable doit se construire « dans l'esprit et le cœur des hommes ». Cette mission éducative concerne non seulement la formation de base, mais aussi l'approfondissement des connaissances culturelles réciproques entre les diffé-

rents pays et peuples, y compris le rôle de la science et de la technologie dans la construction d'un monde pacifique.

Aujourd'hui ces efforts sont tout aussi actuels et urgents qu'il y a 60 ans. Entre-temps le monde est devenu beaucoup plus interconnecté, mais ce ne sont pas les principes d'équité et de justice qui régissent le processus de mondialisation. Il y a une montée des menaces à la diversité culturelle et linguistique, que l'Unesco comme les espérantistes considèrent comme un trésor de l'humani-

## UNESCO, Conférence Générale des ONG

**L'**UNESCO se targue d'être la seule instance des Nations-Unies à ouvrir la porte à la société civile par le biais des Organisations Non-Gouvernementales. Sur les 350 ONG, seule une centaine était représentée lors de la Conférence Générale du 15 au 17 décembre, et seulement 77 ont voté. Les objectifs de la réunion étaient les rapports autour de l'Education pour Tous, l'eau et le changement climatique mais aussi le bilan de l'ouverture géographique par l'organisation de trois Forums au Chili, en Côte d'Ivoire et en Bulgarie, et le bilan de l'ouverture à un nouveau public (notamment les jeunes) par deux journées, dont celle de la Paix, et l'utilisation de Twitter.

L'élection du Comité de Liaison (l'équivalent du Conseil d'Administration) a soulevé de nombreuses questions car les nouvelles directives réservent d'office des places à chaque région géographique. Même si la grande majorité des associations, comme l'UEA, ont leur siège en Europe ou aux Etats-Unis, leur action est internationale mais l'UNESCO ne le reconnaît pas. Aucun candidat pour les pays arabes; un seul



candidat pour l'Europe orientale, la fondation Sozopol, élue d'office. Un seul candidat pour l'Afrique, le Forum des éducatrices africaines, élu. Pour l'Amérique latine et les Caraïbes, un seul candidat, le Conseil latinoaméricain des sciences sociales. Pour la région Asie-Pacifique, 3 candidats, c'est la China folklore photographic association qui a été élue. Pour l'Europe et l'Amérique du Nord, 18 candidats pour 5 postes, tous compétents. On sait qu'ils connaissent les rouages et le fonctionnement de l'UNESCO et peuvent être présents aux



réunions. Mais on compte sur les nouvelles technologies et visioconférences

Monique Arnaud,  
Renée Triolle,  
Veronika Poor,  
François Lo Jacomo.

pour travailler. Le président, Patrick Gallaud, ne pouvait se représenter (le mandat est limité à deux ans), c'est Martine Lévy de l'Association mondiale des guides et éclaireuses qui prend la suite. Côté langues, les représentants de l'Universala Esperanto-Asocio François Lo Jacomo et Renée Triolle, avec Veronika Poór pour TEJO, ont bu du petit lait. Deux journalistes d'Arte introduisent deux films par ces phrases «malheureusement, ils sont en français», ce qui leur vaut une vibrante répartie d'un Marocain francophone. Lors de la présentation des candidats, limitée à 2 minutes, on voit bondir, tel un diable hors de sa boîte, une interprète qui, en furie déclare «nous sommes là pour vous aider, vous parlez trop vite, on ne peut rien traduire!». La résolution finale n'a qu'une version anglaise au grand dam des francophones qui protestent vigoureusement. Mais n'est-ce pas la situation habituelle des Italiens, Allemands, Afghans, Irakiens qui n'ont ni la possibilité ni le confort de travailler dans leur langue ?

Comme toujours, lors de ce type de rencontres, les contacts personnels dans les couloirs, pendant les pauses-café ou les repas, et lors de l'exposition de deux heures dans le hall ont permis de compléter l'information de certains ou de faire connaître l'espéranto à d'autres.

Renée Triolle

## 60 ans d'efforts communs »

nité. L'inégalité, y compris l'inégalité linguistique, progresse dans beaucoup de domaines de la vie humaine, et il y a toujours des persécutions, des conflits et des guerres fondés sur des différences culturelles, religieuses et politiques.

En tant que principale organisation mondiale des espérantophones, l'association mondiale d'espéranto confirme à nouveau la profonde convergence entre ses activités et le travail de l'Unesco. L'espéranto n'est pas seulement un moyen technique de communication, mais aussi

un projet culturel et éducatif, visant une société mondiale durable et équitable. Dans cet esprit nous appelons à un vaste soutien aux efforts de l'Unesco dans les plus divers domaines de l'éducation, de la science et de la culture, et déclarons notre intention de continuer à travailler énergiquement pour leur diffusion et leur réalisation.

**Mark Fettes**  
Président de l'Association mondiale d'espéranto



## BUNTA ESPERANTUJO

### AMO en Afriko

**L**a sepa seminario Aktivula Maturigo AMO-7 okazis en Lomeo, Togolando, kun 29 partoprenantoj el Benino, Ebura Bordo, Niĝerlando, Togolando kaj Svislando, de la 26a ĝis la 29a de decembro 2014. Malferme parolis Apelete Agbolo, estro de la nacia komitatode nuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE), Adjévi Adje, kunordiganto de la Afrika komisiono de UEA kaj ĉefa organizanto de la evento. Alvenis Kokou E. Attaglo, la nove elektita prezidanto de UTE, kaj li bonvenigis ankaŭ la partoprenantojn. Poste laŭtleĝiĝis salutmesaĝoj de Stefan Mac Gill, vic-prezidanto de UEA kaj respondeculo pri la programo AMO, de Lee

Jungkee, estrarano de UEA pri Afriko, de Renato Corsetti, eks-prezidanto de UEA kaj konsilanto de la afrika komisiono, de Jean Codjo, vic-kunordiganto de la afrika komisiono de UEA. Dume, Mireille Grosjean faris tradukan laboron al la ĵurnalistoj ĉeestantaj.

La aktivaĵoj mem komenciĝis tuj post la foriro de la amaskomunikiloj per prezento de Mireille Grosjean pri Unuiĝintaj Nacioj per multaj fotoj. Poste la partoprenantoj ricevis taskon solvendan en grupoj, t.e. kiel prepari sin al kunveno kun ĵurnalista aŭ moŝtulo? Mireille ankaŭ en aliaj tagoj prelegis pri la tutmonda movada strukturo, agadoj lige kun Unesco, prelego kiun ŝi finis per grupa tasko, t.e. kiujn rimedojn oni havas por informi pri Esperanto?

Posttagmeze Apelete Agbolo gvidis la partoprenantojn pri la konstruo de retejo. ok komputiloj estis je dispono, same projekciilo kaj ekrano. Konsekvence ĉiuj povis en etaj grupoj sekvi la malkovron de la programo *web page maker*. Tuj ĉiuj improvizis, kreante amuzajn paĝojn per tiu tre simpla ilo.

Preleganto Adjévi Adjé prezentis la strukturon de UEA en rilato kun la

kontinentaj komisionoj kaj prezentis la laboron de la afrika komisiono, klare kaj detale. Demandoj venis, respondoj kontentigis la demandintojn.

Siavice, preleganto Afantchao-biakou Yao vigle kaj amuze prezentis pri kiel krei kaj mastrumi klubon kaj asocion. Li kaptis la atenton de la partoprenantoj, laborigis ilin en grupoj. Rezulto tuj vidiĝis sur ekrano per projekciilo okaze de sinteza fina parto.



#### En préparation, les prochains dossiers

LME 592 : Les 99 congrès mondiaux d'espéranto

LME 593 : Lille 2015

Envoyez vos contributions à  
mondo@esperanto-france.org

Leĝaj aspektoj de agnosko de asocio, koncepto de statuto, neceso de interna regularo, taskodivido ene de asocio, ktp.

Preleganto Antoine Kouassi kouablan prezentis la Cseh-metodon. Multajn notojn faris la partoprenantoj.

Entute okazis 8 prelegoj, multaj labor-grupoj, praktikaj ekzercoj, rekomendoj al UEA, kaj la tuto okazis en la baza komenca ideo kaj intenco de AMO. La rilatoj inter ĉiuj partoprenantoj estis bonaj, aŭdiĝis kantoj, ŝercoj, registrado de pluraj intervjuoj por 4 naciaj amaskomunikiloj kaj por Muzaiko. Ĉiuj taksis la organizadon bonega kaj manĝojn bongustaj kaj montris grandan ĝojon ĉe la fino kun promeso utiligi la sciojn kaj spertojn akiritajn utile en siaj respektivaj kluboj kaj landaj asocioj.

La afrika komisiono kaj togolandaj esperantistoj dankis ĉiujn pro la partopreno kaj esprimis grandan dankon al prelegintoj kaj al ĉiuj kies klopodoj igis sukcesa tiun unuan afrikan seminarion pri aktivula maturigo, t.e. UEA, eŭropaj kaj ĉefe aziaj samideanoj, kiuj sendis financajn subtenojn. Multan dankon ankaŭ al s-ino Mireille Grosjean kaj al ĉiuj niaj afrikaj samideanoj kiuj venis de diversaj lokoj kaj landoj.

Adjévi Adjé



## En la universitato de Kostariko

**E**n la Universitato de Kostariko (<http://www.ucr.ac.cr>), Esperanto estas ankoraŭfoje semestre instruata de Prof. Hugo Mora Poltronieri en la fako pri filologio, lingvistiko kaj literaturo (<http://filologia.ucr.ac.cr>). Korespondado montriĝis tre utila en pasintaj kursoj, pro tio ni petas al la monda esperantistaro sendi salutkartojn al la suba adreso :

Kurso de Esperanto  
c/o Prof. Hugo Mora Poltronieri  
Escuela de Filología  
Facultad de Letras  
Universidad de Costa Rica  
San Pedro Montes de Oca, San José  
Kostariko/Costa Rica

Ni promesas respondi ĉiujn helikajn mesaĝojn !

Partoprenantoj sekvas bazan E-kurson, elekteblan por bakalaŭraj gestudentoj. Ĝi valoras 3 kredit-unuojn. La kurso komenciĝis antaŭ unu monato. Jam de pli ol 12 jaroj Esperanto estas instruata en la Universitato de Kostariko, kie, krome, profesoroj rajtas ekzameniĝi pri tiu lingvo por supreniri akademiasajn kategoriojn. Poŝtkartoj helpas stimuli lernadon.

Antonio Leoni  
Profesoro pri komputika lingvistiko  
Universitato de Kostariko

## Movade foiri



**L**a celo de la Movada foiro estas prezenti al la kongresanoj panoramon de la tuta Esperanto-movado. Mi unue havis tiun ideon pro itala esperantisto, kiu ĉeestinte sian unuan UK komentis, ke li ne ricevis ĝeneralan impreson aŭ superrigardon pri la movado.

Laŭ tiu vidpunkto, oni povus argumenti, ke la Movada Foiro estis intencita pli por la kongresanoj ol por la partoprenantoj. Sed precipe la Fakaj Asocioj tre ŝatas ĝin, ĉar ĝi donas okazon por konigi sian asocion, inviti la homojn veni al ties kunveno dum la kongresa semajno, instigi ilin membriĝi ktp. Por

la landaj asocioj ĝi eble estas malpli rekte utila, tamen multaj kaptas tiun okazon por prezenti sian agadon al la kongresanaro.

Tiel la asocioj havas okazon por rekte paroli al la homoj, kiuj haltos ĉe tablo, rakonti al ili pri sia agado, instigi ilin membriĝi, montri siajn produktojn, aŭdigi diskojn per komputilo, ktp.

La sukceso de la Movada foiro dependas de la nombro de asocioj, kiuj partoprenos. Ju pli da asocioj, des pli oni ricevas impreson pri la vasteco, varieco kaj bunteco de la Esperanto-movado.

Anna Lowenstein

# Internacia festivalo, la ĝusta koktelo



**Ĉ**u vi deziras polan bieron, germanan blankan vinon, rusan vodkon, koktelon aŭ ginsengan teon? En kiu trinkejo vi estas? Kompreneble en la Knajpo (1) de Internacia Festivalo (IF), la koro de la etosa vivo de la renkontiĝo.

La koktelo IF plufunkciis por la 31a fojo, de la 27a de decembro 2014 ĝis la 3a de januaro 2015 en komforta hoteleca domo de la ĉeno JUFA apud la germana urbeto Jülich. Kvankam la longjara ĉeforganizanto HDP (Hans-Dieter Platz) klopodis organizi kelkajn fuŝojn, por ke ni ne tro bedaŭru, se ne plu estus IF, li tion ne vere sukcesis.

La internacian vintran universitaton, en ties 8a eldono, kiel kutime rektoris d-ro Amri Wandel el Israelo. La ses prelegoj estis ĉiuj sekvataj de ekzameno, kio estas unuafoja afero, kaj la 40 partoprenintoj de la ekzameno sukcesis, du el ili per la maksimuma nombro da poentoj. Ŝajnas, ke tio estas rekordo. Ene de la kadra temo « energio », Alfred Schubert traktis la demandon pri energi-ŝanĝo en Germanio. Amri Wandel prelegis pri la scienca revolucio de Einstein kaj ankaŭ pri la vivo sur foraj planedoj kaj pri la novaj esploroj dank'al la spacteleskopo Kepler. D-ro Dieter Kleemann havis tute originalan temon, t.e. « Romkatolika misia agado en Japanio kaj la sekvoj por la socia strukturo kaj politiko de la lando ». Interese estis aŭdi pri la kontribuo de Rusio al la monda

Esperanto-literaturo, fare de Mikaelo Bronstein.

Kiel ofte plej multaj prelegoj kaj kontribuoj estis ekster la kadra temo, sed tio tute ne gravas. Pri « Rusio kaj Ukrainio, la du ŝtatoj, ĉu frataj? » raportis Mikaelo Bronstein, sed dum ni eksciis pri la longa historio ekde pratempoj de tiu mondoparto, iom frustre estis, ke restis pli malpli nur deko da minutoj por analizi kaj debati la aktualan situacion, kio estis la temo, pro kio ni venis aŭskulti lin. Tre interesa estis

la rakonto de Karl Breuninger, kiu pasigis sian infanecon en Sovetio pro tio, ke lia patro, germana sciencisto, estis inter tiuj inĝenieroj kiuj estis perforte translokigitaj al Sovetio, por tie labori kompanse al la teruraj damaĝoj en la venkintaj ŝtatoj.

## Inter la diversaj aktivaĵoj estis saŭno kaj ekzercoj por nia sano

Multon pluan oni povus mencii, sed fariĝus teda katalogo. Tamen, ni notu prezentojn pri fabelaj mondoj kaj pri fabeloj de la rusiaj popoloj, ŝatata ĉeftemo de Anna Striganova, bildan prezenton pri Argentino, lando de la pasinta UK, fare de Baŝka Muhlemann, prelegon de Harald Schicke pri alia alirmaniero al malsanoj. Inter la diversaj aktivaĵoj estis saŭno kaj ekzercoj por nia sano, kiel tajĝiĉuano, dancgimnastiko kaj promenoj.

Dum la ekskursata tago ni havis la okazon rapide konatiĝi kun la fama urbo Köln kaj malafablaj kelnerinoj. Tiel naskiĝis trafa materialo por skeĉo de la internacia vespero.

Dum la plilongigata tago ni kvazaŭ pilgrimis al la trilanda punkto de Germanio, Nederlando kaj Belgio, kaj al la iama neŭtrala ŝtato Moresnet.

La vesperojn reĝisoris kiel kutime Mikaelo Bronstein. La bonveniga

vespero komenciĝis triste, per memorigo de forpasinta fidela partoprenanto Rémy Bouchet. Tamen ni konstatis, ke surprize venis tuta aro da « novaj » homoj (en la senco de unuafojaj partoprenantoj de IF). Ŝajne ili ŝatis la tutan etoson kaj estus pretaj fariĝi kutimaj abonantoj de IF.

## Silvestra vespero funkciis laŭ la kutima skemo

La rusa vespero suferis je teknikaj problemoj, sed bone funkciis la latva « Vento Baltia » kaj la barda liriko de Nataŝa. Kaj la filmo kiun kompilis Liba kaj Floréal Gabalda pri la pasintaj IF-oj revivigis la historion de la aranĝo, kiam venis multe pli da familioj kun infanoj, kiam ni ĉiuj estis ankoraŭ junaj...

Silvestra vespero funkciis laŭ la kutima skemo, bufedo (ne tre speciala), polonezo inaŭguranta la balon, novjaraj kisoj laŭ la horzonoj de la partoprenantoj... kaj longa noktumado, ĝis la nova jaro ie en Norda Ameriko... La internacia vespero estis tre varia kaj iom longa, kun kontribuoj el multaj partoprenantoj. Adiaŭa vespero estis jen gaja, jen trista. Tosto kun ŝaumvino, muziko...

Sed ĉiuvespere post la "oficiala" programo sekvis la knajpa ne-programo kun senfinaj babiloj, t(d)rinkado, kantoj, eĉ foje dancado... Akordionistoj, gitarludantoj kaj ĉiuj kantantoj kreis viglegan neforgeseblan etoson ! Dum plena semajno ĝojis vivi kune en Esperantujo homoj el 18 landoj, sen movadaj diskutoj, krom pri la plua okazigo de IF.

Jam paliĝis mia ekzemplero de la IF-kajereto. Iom triste, ke laste. Ĉu vere la lasta? HDP decidis emeritiĝi, sed eble venos IF Nova (kiun ni prefere ne nomu NIFO). Sed kiu pretos dediĉi al ĝia preparado tiom da energio, kiel senlace kaj brile faris HDP ?

**Claude Nourmont (31-foja partopreninto)**

(1) el la germana «Kneipe», etosplena gastejo.

## Interna debato

### Kial Esperanto povus profiti de RIC\* ?

**P**ro ne sufiĉa informado, la komitato de UFE malprobis subtenon de enkonduko en la 3a artikolo de la franca konstitucio de la \*Referendumo Iniciatita de Civitanoj (RIC). Mi ja plusendis la proponon al la komitato, laŭ peto de la asocio «Artikolo 3» kies nura celo estas enkonduko de tiu nova ebleco, sed ne povis detale klarigi ĝin nek ĝiajn gravajn ligojn kun eblaj oficialiĝoj de Esperanto.

#### Kial Esperanto neniam ricevas oficialan aprobon de la ministerioj en Francio ?

Esperantistoj povas konstati, de pluraj jardekoj, ke la promesoj de ministroj, deputitoj aŭ eĉ de prezidentoj neniam atingas konkretiĝon, malgraŭ ricevo de foje tre belaj vortoj aŭ subtenleteroj. Eĉ petskriboj kun miloj da subskriboj finiĝas en rubujo de la ministerioj... Kiu decidas, ĉu modifi leĝon aŭ regularon? Ministroj. Aŭ pli precize iliaj kunlaborantoj. Poste, la deputitoj povas modifi la leĝproponojn de la registaro, sed la registaro konservas la rajton forigi leĝprojekton de la parlamenta sesio kaj forte gvidas la voĉdonadon de la deputitoj de la sama partio. Tiel, la registaro ĉiam protektas siajn interesojn kaj defendas nur tion kio interesas ĝin. Tamen, kiel legantoj de LME vi scias, ke Esperanto povas helpi al lernado de aliaj lingvoj kaj fakoj por lernejoj, ĝi ankaŭ faciligas internacian komunikadon kaj rektajn rilatojn inter civitanoj de diversaj landoj, ĝi malhelpas antaŭjuĝojn pri aliaj kulturoj kaj kreskigas la amikecon inter popoloj. Ĉu Esperanto estas interesa por la registaroj? Mi forte dubas pri tio. La nuna politiko, almenaŭ en Eŭropo, baziĝas

sur forta informado, tre kontrolata kaj orientata laŭ la bezonoj por kapti favoron de la civitanoj kaj gajni voĉojn okaze de la venontaj balotoj. Ĉar Esperanto ne respondas al tia bezono (aŭ eĉ povus foje kontraŭi ĝin), registaroj ne subtenas la disvastigon de la lingvo.

#### La esperoj de civitanaj iniciatoj

Se rilatoj kun politikistoj estis foje kuraĝigaj, ni nun povas konstati ke ni ne povas atendi multe pli tiuflanke. Do, ni koncentriĝu ĉe la civitanoj, inter kiuj, en Francio, nur triono aŭdis iam pri Esperanto (1). Se ni sukcesas nian informadon, iom post iom francoj logike subtenos la lingvon ĝis... ĝis kio ? Hodiaŭ, male ol por Esperanto, granda plimulto de francoj subtenas ideon ke la registaro agu kontraŭ poluo de la medio (aero, akvo, grundo), kontraŭ klimatsanĝiĝo, por protekto de la sano, por kontrolo de la bankoj kaj financkompanioj, ktp. Sed kio okazas? Ĉu tiu subteno kondukas al konkretaj decidoj aŭ leĝoj je la nivelo de la graveco de tiuj prioritatoj? Mi lasas vin respondi. Mi persone pensas ke pli larĝa subteno de Esperanto en la lando ankaŭ ne kondukus al pli forta oficialiĝo ol hodiaŭ.

#### La propono de asocio Artikolo 3

La nuna konstato pri malforteco de la popolo estas ke ĝi ne decidas mem pri la leĝoj kaj reguloj de la civito sed donas povon al reprezentantoj kiuj laboras post elekto kadre de naciaj partioj kun privataj interesoj pli gravaj ol la kolektivaj. Por redoni iom da povo al la civitanoj, la ideo de Artikolo 3 estas ebligi la RIC, kiel ĝi jam ekzistas ekzemple en Svislando. Tiu ideo ne garantias sukce-

son al ĉiuj interesoj de la civitanoj sed estas paŝo antaŭen tiurilate. Jam dekoj da asocioj kaj organizoj komprenis la gravecon de tiu ebleco kaj subtenas ĝin (listo ĉe [www.article3.fr](http://www.article3.fr)). UFE estis kontaktita pere de mi, ĉar iuj membroj de Artikolo 3 subtenas Esperanton kaj ni havas eblecon subteni aŭ ne la jenan tekston kiu modifas la nunan artikolo 3 de franca konstitucio aldonante parton post la vorto «referendumo» t.e. «La nacia suvereneco apartenas al la popolo, kiu regas ĝin per siaj reprezentantoj kaj pere de referendumo [laŭ civitana iniciato, pri ĉiuj temoj, inkluzive konstituciajn aferojn kaj la ratifadon de traktatoj; tiu ĉi artikolo povas esti modifita nur per referendumo.]» (originalo de la propono en la franca estas «La souveraineté nationale appartient au peuple qui l'exerce par ses représentants et par la voie du référendum [d'initiative citoyenne, en toutes matières y compris constitutionnelle et de ratification des traités ; cet article ne peut être modifié que par voie référendaire.]» La aldonado estas interkrampoj.)

#### Ĉu UFE organizu voĉdonon pri tiu principo ?

Tia nekutima temo por UFE meritas diskuton kiu ne povas okazi dum komitat- aŭ membrokunsido, pro manko de tempo, sed povas okazi en interreta grupo «ufe-debatoj» aŭ dum speciala laborgrupo se la membroj deziras tion. Ankaŭ estas facile kaj senpage organizi interretan voĉdonon pri tio. Kion vi opinias pri tio ?

Bruno Flochon  
[bflochon@esperanto-france.org](mailto:bflochon@esperanto-france.org)

(1) Laŭ enketo de 2009 far pluraj esperantistoj surstrate en Francio.



## Preparado de UK 2015 en Francio

# Ni ĉiam pretas diri jes por partopreni en kongres'



**L**a ideo okazigi lingvan preparkurson por la helpontoj kaj organizantoj de kongresoj jam de multaj jaroj okupas min. Mi mem sukcesis tiucele kunlabori ekzemple antaŭ la kongreso de Adelajdo. UK en Francio, kie mi regule gvidas kursojn, revokis en mi la projekton kaj mi proponis al Arlette kaj Edmond Plutniak, la organizantoj de la Eŭropa Rendevuo, dediĉi mian kurson en Stella Plage por tiu celo. Nek mi, nek ili antaŭvidis, ke estos tiom granda la intereso pri la programo.

Origine mi imagis grupon de komencantoj kaj komencintoj, por kiuj mi pretigis simplajn, sed amuzajn dialogojn, situaciojn kaj rolludojn, vortolistojn pri tipaj esprimoj en la kongresejo kaj specifajn gramatikajn ekzercojn pri datoj, horoj, tiklaj verboj. Mi kontaktis UEA por ricevi la manlibron de la kongres-organizantoj - kiun mi tamen ne ricevis - kaj provis akiri informojn de la kongresa komitato pri la urbo, kongresejo kaj iliaj planoj. Ili ne nur helpis, sed kunportis al ni urbomapojn, turismajn gvidlibrojn, malnovajn kongreslibrojn ktp. Dankon pro la helpo.

## La niveloj variis de tutkomencanto ĝis la plej spertaj

Kelkajn tagojn antaŭ la renkontiĝo mi eksciis, ke pli ol 35 personoj aliĝis al la kurso kaj la niveloj variis de tutkomencanto ĝis la plej spertaj, longdaŭraj aktivuloj en la movado. Kaj vere, eĉ el la Loka Kongresa Komitato (LKK) ni havis *spionojn*. Estis belega pedagogia defio.

La laboron mi planis okazigi en daŭre ŝanĝiĝantaj laborgrupoj, foje homogenaj, foje heterogenaj, laŭ la lingvaj niveloj. La tuta programo fine interplektis akiron de leksikaj kaj gramatikaj konoj



kun la informoj kaj praktikaj sciindaĵoj pri la kongreso kaj movado.

Jen kelkaj aktivaĵoj el nia programo, ekzemple kolektado kaj rakontado de spertoj pri kongresoj, la plej belaj, neforgesiblaj kaj nepre forgesendaj momentoj kaj programoj, (plaĉis al mi, por mi estas forgesinda); grupa kolektado de kongresaj programoj kaj eventoj kun (mal)rekomendoj al la aliaj; vojaĝ- kaj loĝmanieroj (elektas, preferas); imago de eventualaj problemoj, plendoj kaj tiurilate necesaj parolturnoj, esprimoj (kiel salutoj, bonvenigoj, komplimentoj, bedaŭro, kontenteco, gratuloj, peto de informoj, esprimoj kun MANKAS al mi IO, eblo interkomunikiĝi pri problemoj, sanstato, interkonsento pri dato kaj loko de rendevuoj (ne rAndevuoj), ktp. Apartan atenton ni dediĉis al la fifama akuzativo kaj al la uzo de verboj kiel komenci/komenciĝi, fini/finiĝi, fermi/fermiĝi, movi/moviĝi, daŭri, manki, ŝanĝi/ŝanĝigi, kosti, preferi, kaj al la esprimoj kun POR KE.

## Vendi eksurseblon vojaĝi sur dorso de birdo

La tuto estis enplektita en aktivaĵojn, inter ili en verkadon de anonco por la

rendevua tabulo (kun uzo de verbo MANKAS). Ni provis vendi laŭ la stilo de Humphrey Tonkin diversajn esperantaĵojn en la aŭkcio, krei reklamojn kaj varbotekstojn pri allogaj turismaj programproponoj. Inter tiuj plej multajn aliĝojn de la publiko kolektis la vojaĝagentejo *Per facila vento*, kiu vendis eksurseblon vojaĝi sur dorso de birdo kaj admirari la belegan nordan regionon. Oni estos per magio malgrandigitaj, sed antaŭa fastado bonvenas. La kosto estos unu kilogramo da tritiko, sen kritiko. Alia agentejo ĝuste volos malfastigi la klientojn kaj anoncis ekskurson por franduloj tra la kafejoj de Lille. La tria grupo BĈŜ estis influata de la filmo « Bonvenon ĉe la Ŝtioj », do invitis nin al Bergues kaj proponis tagmanĝon en la fritejo de Momo. Tagfine estos eblo esti fotita dum pisado en la riveron. Laŭ alia konkuranta agentejo oni ne povos mistrafi ekkoni ankaŭ Lillon, kaj senpage aŭskulti la P'tit Quinquin, kies kanton ni mem aŭdis dum la varbprezentado.



## La ofertoj de la oficiala programpropono de UEA certe estos tute aliaj

La agentejo Norda Ŝtelo, pardonu, Norda Stelo varbis por sia urbo Araso, lulilo de la nordfrancia movado. La belga konkuranta grupo *Sen io en plena suno* kunligis sian proponon kun la ILEI-konferenco kaj konante la finan-can situacion de la Esperanto-instruistoj proponis amuzaĵon en la belega urbo Bredene, kie regas unika klimato kaj objektiva realo. Ĉio klare kaj senpage montriĝos en la naturista strando. Kara Leganto, antaŭ ol elekti por vi ekskurson dum la 100-a UK en Lillo, bonvolu atendi la oficialan programproponon de UEA, kies ofertoj certe, almenaŭ laŭ la prezoj, estos tute aliaj. La semajnfino trateksis la kanzono de Jak Le Puil pri la kongresoj, kiun ni plurfoje aŭskultis kaj dume spektis la filmon pri la historio de la kongresoj, kompilitan de Pzremek Wierz-

bowski. <https://www.youtube.com/watch?v=nHIY3MYW1OU>

Nia provo verki novan tekston por la melodio, kunlige al la 100-jara jubileo kaj Lillo, komplete fiaskis... do, ni lasos pluvi la originalan version de Ĵak. Bedaŭrinde ni ne havis tempon por la oratora konkurso, kie mi volis roligi la kandidatojn kun la sama teksto, prezentenda en diversaj manieroj, kvazaŭ ili estus legataj de pastro, sportkomentisto, juĝisto, militisto, virgulino kaj de Zamenhof mem.

La kulmino kaj ankaŭ la fino de la seminario estis rolludo, en kiu partoprenis ĉiuj grupanoj kun diversaj roloj. Ni revivigis la eventon, kiam dum la roterdama kongreso pro la rigoreco de la fajrobrigadistoj ni havis tiom da malagrablaĵoj. Ekzemple por la prelego pri Vincent van Gogh pli ol duono de la interesigantoj ne povis eniri la saloon, tial mi, Katalin, puĉe okupis la grandan festalonon kaj tie prezentis la programon antaŭ plurcent tre kontentaj homoj, tamen malhelpante Ĵomart kaj Nataŝa provludi, kaj entute elvokante grumblajn atakojn fare de LKK. En la ludo Aleks Kadar (kvazaŭ Barbara Pietrzak) brile sendis vivan raporton al Pola Retradio pri la skandalo, fajrobrigadanoj kaj kongresaj helpantoj luktis kontraŭ la homamaso, sed Ĵomar kaj Nataŝa fine raviĝis pro la emocioj, kiujn elvokis la forpaso de Van Gogh.

Informojn pri la kongreso malkaŝis ankaŭ la staĝfina viva RISKO-ludo (nun tre populara ludo de [www.edukado.net](http://www.edukado.net)) por kies demandoj mi enŝtelis multajn pensigajn informojn pri la pasintaj kongresoj, sed ankaŭ pri la onta en Lillo.

La publiko tie konsciiĝis pri tio, ke la aktuala aliĝnombro estas tristige malalta kaj ankaŭ francoj ne abundis en la listo.

Do, je nova invito ni tuj pretis diri jes por partopreni la kongresoj.

Katalin KOVÁTS



## en bref • mallonge

### • ĈU VI ĈEESTOS ETAPON DE LA RONDIRO ALTERNATIBA 2015 ?

«Ni ŝanĝu la sistemon, ne la klimaton ! Kune ni konstruu pli bonan mondon, akceptante la klimatan defion ». Jen la frapfrazo kiu gvidas la aktivulojn kiuj biciklos 5.000 km tra Francio dum 4 monatoj por informi pri la multnombraj lokaj festivaloj Alternatiba kiuj okazos en multaj urboj kaj pri la klimatsanĝo kiu endanĝerigas nian estontecon.

Alternatiba montras, ke la solvoj al la malreguliĝo ekzistas kaj, ke plie, eblas konstrui socion kaj vivon pli humanajn, pli justajn, pli solidarajn, pli afablajn kaj finfine pli dezirindajn. Kompreneble, Esperantu havu sian lokon en tiu nova mondo.

Pli da informoj ĉe (franclingve) <https://alternatiba.eu/tour2015> aŭ en Esperanto ĉe Emile Mas, [espergala@wanadoo.fr](mailto:espergala@wanadoo.fr) kaj Philippe Stride, [philippe.stride@gmail.com](mailto:philippe.stride@gmail.com).



El la LERNILOTEKO de **edukado.net** Aŭtoro: Katalin KOVÁTS

### La prezidanto konsilas, ke...

vi kreu frazojn laŭ la esprimoj de la tabelo. Necesas, ke vi atentu pri tio, ke post la vortoj, esprimantaj volon, deziron, admonon, konsilon, postulon, peton, neceson, ordonon en la subpropono ni uzas -u-modon.

la prezidanto konsilas, ke...	deziras	aper-		
gastoj	dezirindas	atent-		
organizantoj	gravas	ĉes-		
LKK-estro	konsilas,	ferm-		
la kongresejo	necesas,	funkci-		
preleganto	nepras,	ir-	-ig	
kasisto	petas,	okaz-		
ĉiĉerono	preferas,	komenc-	-ig	
amiko	postulas,	ŝanĝ-		
instruisto	volas,	pag-	-o	
redaktoro		send-		
elpantoj		kun-		
artistoj		ripar-		
uzikisto		parol-		
kongresejo		publik-		
scenejo		est-		
salono		vojaĝ-		
akceptejoj		trov-		

ke

certe dubas, eblas, esperas, ne kredas, konfesas, timas,

Gramatika skizuro: Nivelo: B1-B2 1/1

## Prelegvojaĝo en Francio

# Turneo de Ana Songanta (Shin Eun-Sook)

**A**na estis invitita de la klubo de Bourg-en-Bresse por gvidi diversajn aranĝojn kaj ni kaptis la okazon por organizi prelegvojaĝon de la 15a ĝis la 25a de septembro. Tiu dektaga periodo ebligis starigi mallongan turneon kun 5 etapoj en La Ciotat, Clermont-Ferrand, Angers, Le Mans kaj Hérouville-Saint-Clair. Atingis nin tre favoraj eĥoj de Pluezek, kie ŝi intervenis kiel kursgvidanto antaŭe. Ni senhezite asertas, ke tiu turneo plene konfirmis la talentojn de Ana.

Ana estas tre agrabla virino kaj gasto, kiu bonege kaj klare prezentis sian lernejon, kie ŝi instruas Esperanton per tre modernaj kaj viglaj metodoj kaj iloj (i. a. Skajpo) en rilato kun esperantistaj eksterlandaj kolegoj. Al ĉiuj plaĉegis kaj ŝi kaj ŝia prelego pri la alternativa lernejo kie ŝi laboras. « Post ŝia prezento nekutime okazis eĉ longa diskuto kun ĉiuj ĉeestantoj » aldonas Angers kaj konfirmas Hérouville-Saint-Clair, kie ŝi tre sukcese intervenis kadre de la Ĝenerala asembleo de la normanda asocio.

Al ĉiuj kluboj « ege plaĉis ankaŭ ŝia parol-libereco pri diversaj temoj ».

Okazis publikaj kunvenoj en La Ciotat, Marseille, Clermont-Ferrand, Mozac kaj Le Mans. En Angers, la kunveno estis nur esperantista. En Hérouville, Ana partoprenis la normandan aranĝon kaj ankaŭ la publikan inaŭguron de Skvaro « Esperanto » okaze de la tridekjariĝo de la loka asocio.

Entute, 140 homoj aŭskultis ŝin dum prelego. Plej multaj estis esperantistoj. Aperis du artikoloj kun foto en « La Montagne » (Clermont-Ferrand) kaj « Ouest-France » (grupa foto en Hérouville). Estis kunlaboro kun kulturaj, sociaj kaj politika asocioj en La Ciotat-Marseille, Clermont-Ferrand, Le Mans kaj Hérouville.

Kiel pli bele konkludi ol Angers ? « Nun, kiam ni scias precize, kion Ana povas prezenti, kaj ankaŭ nun kiam ni scias, kiom bonkvalitaj kaj interesaj estas ŝiaj paroltemoj, certe ŝi revenos ! ». Jes

ja, Ana revenu, nepre revenu !

Dankon al vi, dankon al la kluboj kiuj vin gastigis kaj al Bourg-en-Bresse kiu havis la bonan ideon vin inviti.

Yves NICOLAS

## Intervjuo de Ana Songanta

En Esperantujo oni nomas min Ana Songanta kaj koree SHIN EUN-SOOK.

Mi estas instruistino de supermeza LLG (Libera Lernejo por Geknaboj). LLG estas alternativa lernejo kaj edukad-movado en Koreio. Ĉefe pro alternativeco mi eklernis Esperanton. Fine de la jaro 2006, kiam mi laboris en iu elementa LLG kiel ĉefino de geinstruistoj, nia lernejo cerbumis por serĉi alternativan fremdan lingvon koncerne al la temo « Paca mondo ». Finfine, ni trovis Esperanton ankoraŭ vivantan en la mondo! Kelkajn monatojn lerninte Esperanton, mi komencis fari animadon pri la paca lingvo Esperanto al niaj infanoj per kartoj, dancoj kaj ludoj.

Poste mia familio havis projekton lasi urban vivon en Seulo kaj translokiĝi al kamparo por ĝui naturan vivon. Antaŭ la projekto, ni vojaĝis unu monaton en Herzberg, oficiale nomata Esperantourbo en Germanio. Dank'al tio mi ekkonatiĝis kun multaj fremdlandaj esperantistoj. Post reveno en Koreion iu supermeza LLG dungis min kiel fakan instruiston pri Esperanto.

En nuna supermeza LLG, mi celas, ke adoleskantoj lernu Esperanton tri semestrojn kaj poste lanĉu E-vojaĝon por apliki la lingvon. En la jaro 2011, dek lernantoj (18 jaraĝaj) vojaĝis kun mi al Germanio kaj Francio dum 45 tagoj. Kaj sekvan jaron mi kondukis aliajn al Ĉinio kaj



Japanio. Ĉi-jare ankaŭ dek adoleskantoj preparas vojaĝon al Hungario kaj Slovakio. Dum la vojaĝo ili libere naĝas en Esperantujo, kiu estas kvazaŭ internacia maro por ili. Tie kelkaj rapide libere naĝas kiel gajaj fiŝoj. Se kelkaj ŝajne dronus, ili estas tiritaj de la grupo, kiu konsistas el amikaj kamaradoj. Ĝuste pro tiu cirkonstanco, lernantoj de LLG estas pli liberaj kaj kuraĝaj.

Junuloj energie ĝuas ĉiun momenton dum la vojaĝo interne de Esperanto aŭ ekstere de ĝi. Kvankam mia historio pri Esperanto ne estas tiom longa, Esperanto donis al mi tiom da ŝancoj por puŝi horizonton. Jen miaj paŝoj kun Esperanto :

- vojaĝi al Herzberg (2009)
- vojaĝi al Francio, Germanio kun dek studentoj de LLG (2011)
- gvidi kurson kadre de Friska Lernejo, en Osaka, Japanio (2011)
- vojaĝi al Hispanio, Francio kun kvin kolegininoj de LLG (2012)
- prelegi en Kansai-ligo, Japanio (2012)
- vojaĝi kun LLG lernantoj al Ĉinio, Japanio (2012)
- vojaĝi al Ĉeĥio, Slovakio (2013)
- gvidi kurson kaj prelegi en Pluezenrenkontiĝo (2013)

Mi esperas, ke la prelegvojaĝo donos al ni

## Lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispono de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio

# Franca Esperanto-Instituto

ambaŭ ŝancojn malkovri freŝan mondon kaj vidpunkton dank' al Esperanto. Mia koro jam tamburas renkonti vin !

Ana Songanta

## LLG & Esperanto, freŝa vento en Koreio !

Liberigita lernejo de la ŝtato,  
Sen lernejestro,  
Sen konkurado,  
Sen ekzameno.

Kion vi povus imagi pri la ĉi supraj asertoj ? Jes, ili parte klarigas pri LLG en Koreio. LLG signifas jenon, *Libera Lernejo por Geknaboj*. En Koreio preskaŭ du cent LLG-j ekzistas kaj ilia historio komenciĝis antaŭ 20 jaroj.

LLG estas libera lernejo. Lernantoj rajtas elekti lecionojn, kiujn ili volas lerni. LLG celas, ke infanoj havu propran revon kaj faru tion, kion ili mem deziras. LLG estas alternativa vojo, kiu eliris el tro strikta edukad-sistemo. LLG inklina al alternativa vivmaniero. Ili eĉ serĉas alternativan fremdan lingvon por pace komunikigi kun tutmondanoj. Ĉu per la angla ? Ĉu per la ĉina ? Ne eblas, ke potenca lingvo rolos kiel neŭtrala lingvo inter homoj. Finfine LLG ekrenkontis pacan komunikilon, Esperanton. Nuntempe LLG-anoj komencas aktive lerni Esperanton. Kaj ili krias, ke Esperanto kaj LLG tre bone akordiĝas unu kun la alia.

Mia prelego temas pri :

- Kio estas LLG en Koreio ?
- LLG ekinundas Esperanto
- LLG bredas revon

Dum la prelego vi povus renkonti aktivajn LLG-anojn, revplenajn junulojn, kiuj puŝas sin al pli fora horizonto kaj Esperanto transmisiĝas al LLG kun paca energio. Certe, vi konstatos, ke en Koreio jam vigle blovas freŝa vento, Esperanto & LLG.

**N**ia kunsido okazis la dimanĉon 5-an de oktobro 2014 en la sidejo de SAT-Amikaro.

La studendaj verkoj por la Atesto pri Supera Lernado restos la samaj por tiu ĉi jaro:

- *La fotoalbumo* de Trevor Steele ;
- *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* de Manuel de Seabra ;
- *Kredu min, Sinjorino* de Cezaro Rossetti ;

- *Ne ekzistas verdaj steloj* de Liven Dek.

La kunvenantoj devis plian fojon konstati la malmultecon de kandidatoj. Entute okazis nur tri sesioj en 2014, kun entute 11 kandidatoj. Leviĝis la demando, ĉu tiu malabundeco ŝuldiĝas al la konkurenco de la KER-ekzamenoj, kiuj konas grandan sukceson. Fakte, ambaŭ ekzamen-sistemoj devus esti rigardataj komplementaj, kaj ne konkurencaj. La FEI-ekzamenoj taksas la kapablon traduki al kaj el la franca, kaj la sciojn pri movada kulturo. Pri tiuj ĉi aspektoj

la KER-ekzamenoj tute ne okupiĝas. Plie, pluraj FEI-anoj atentigis, ke la momenta sukceso de la KER-ekzamenoj grandparte dependas de la bontrovo de la nuna registaro en Hungario kaj ke tio povos esti nuligita okaze de reĝim-ŝanĝo. Tial FEI opinias ke gravas konservi la unua- kaj dua-gradajn ekzamenojn, kiujn kelkaj volis forigi.

Sed antaŭ ĉio plej gravas instigi niajn kursgvidantojn puŝi siajn lernantojn al trapaso de ekzamenoj. Neniu homo trapasis la Kapablecon en 2014. Do, ne hezitu kaj elektu unu el la tri fakaj branĉoj, nome pedagogio, turismo kun interpretado, sciencoj kaj teknikoj.

Se la tarifoj por la diversaj ekzamenoj estas obstaklo por vi, vi povos peti helpon de via grupo (jam kelkaj tion faras).

Por pliaj informoj ne hezitu viziti nian TTT-ejon: <franca-esperanto-instituto.net>

Jak Le Puil  
Sekretario

## Gazetaraj komunikoj

# Uzu la servon pri ekstera komunikado de la landa asocio !

**S**e via grupo aŭ via federacio organizas eventojn, la vicprezidanto de Esperanto-France pri eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado (VP ERIK) proponas plusendi viajn informojn al ĵurnalistoj (landaj aŭ regionaj), uzante la abonon kiun la asocio pagas por jamaj gazetkomunikoj.

Sufiĉos sendi al [presse@esperanto-france.org](mailto:presse@esperanto-france.org), du semajnojn antaŭ la evento, tekston duonpaĝan kun titolo, dato, ligiloj kaj bildo, laŭ modeloj legeblaj ĉi-tie, <http://esperanto-france.org/com-muniqués-de-presse>.

Por rapidaj informoj tra la sociaj retoj (Facebook, Twitter, Google+), sendu

maksimume 140-karakterajn tekstojn unu semajnon antaŭ la planita dissenda dato.

Tiuj proponoj ne malebligas al vi daŭre informi la lokajn de vi konatajn ĵurnalistojn !

DL

The screenshot shows the website interface for Esperanto-France. At the top, there is a navigation menu with links like 'ACCUEIL', 'PLAN DU SITE', 'CONTACT', 'ADHÉRIER', 'BOUTIQUE', 'PRESSE / MÉDIAS', and 'ESPÉRANTO'. Below the menu is a search bar. The main content area is titled 'Communiqués de presse' and contains a list of news items with dates and titles, such as '4 mars 2015 - ICoS'15, espace culturel international de Lyon, fête des 18 ans', '18 février 2015 - 21 février : journées internationales de la langue maternelle', and '15 décembre 2014 - Journée Zamenhof 1944 par les espérantophones du monde entier'. There is also a sidebar with categories like 'ESPÉRANTO', 'PUBLICATIONS', 'BOUTIQUE', 'ÉVÉNEMENTS', and 'QUI SOMMES-NOUS ?'.

Premiitaj verkoj de la belartaj konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, Mondial, Nov-Jorko

## Trikontinenta magra sed tamen agrabla rikolto

**A**ntaŭ ol ricevi la recenzotaĵon, mi opiniis, ke temas pri libreto same dika kiel ekzemple Beletra Almanako, sed tute ne, la verkaro ampleksas nur 61 paĝojn kaj la unuaj premioj plej ofte estis nealjuĝitaj pro manko de kandidatoj. Kelkfoje troviĝas la sama nomo de verkistoj en diversaj fakoj. Tiuj ĉi estas Poezio (3 verkoj), Prozo (4), Teatraĵo (1), Eseo (2), Infanlibro de la jaro (por la eldonisto) (1).

Tamen partoprenis en ĉiuj fakoj inter 2 kaj 14 aŭtoroj el Eŭropo, Ameriko aŭ Azio. Ankaŭ la juĝintoj devenas el diversaj partoj el la mondo. Ili estas elstaraj kaj dividas la saman Esperanto-kulturon. Temas ekzemple pri Detlev Blanke, Tim Westover kaj Giridhar Rao.

Ekde la unua impresado plaĉis al mi la legaĵo. Mi ne estas fanatikulo pri poezio en esperanto, sed la tri poemoj ne estas hermetikaj, unu estas (preskaŭ) tute klasika soneto, laŭ la skemo a-b-b-a, a-b-b-a, c-d-d, c-d-d (krom por «migras» kiu rimas kun Marola [insuleto en la buŝo de la golfeto Corunha, indikas al ni piednoto/ sola/ nigra]. Sed strikta formo ne ĉie tra la mondo estas grava afero en la nuna poezio; la sento pri melankolio, tristeco elversiĝas bone el la tri versaroj, *Soneto de la lumturo*, *Olivero aŭ sinmortiginto*, *Fino de la lernojaro*.

### En la tri poezioj, la vortprovizo apartenas al malgaja leksika kampo

La du aliaj, ambaŭ de la sama verkisto plenas je melankolio sed ne samspece. Kelkfoje estis kreita bela vorto kiel *la lasta sunrebrilo/ fordronis brunsumate*. En la tri, la vortprovizo apartenas al malgaja leksika kampo, « koŝmaraj marserpentoj », « droninte mi marfunde kuŝas sola/ ĉe nigraj algoj, nigra roko, sablo nigra ». « Via trista rigardo perdiĝis/ en sombra kaŝejo –per ŝnur- / en fata tento de l'abismo »... «La nokto flusa invadas/ ...la koron ekabisman de l'oldulo ».

En la prozo de la 4 noveloj, aperas klasi-

kaj temoj, ekzemple perforto, sinmortigo, melankolio, amo (tamen!). La verkintoj trovis bonajn finfrazojn. Eble tiu de La Akacia Parfumo tro rememorigas tiun de Spomenka Štítec en Tilla. « Iu malfortaodoro levigis el la botelo. Tiel odoras la pasinteco ». Kaj tie « el la manoj falas la malfermita botelo. Elfluas akacia parfumo ». En Adiaŭo estas la vidado, kiu havas la gravan rolon, sed tiu de la modelino en la pentraĵo, unue en la ateliero de la pentristo, poste en muzeo. Bona ideo. Tri virinoj – tri destinoj apudmetas tri senrilatajn rakontojn, ne ĝojgajn, sed pri virinoj kiuj je la fino tamen trovas solvon, same kiel la kuracisto de Kristana nokto kiu estas bela jarfina fabelo.

### La teatraĵo ŝajnas facile ludebla, ĝi estas sprita kaj refreŝigas la pramiton

Pri teatraĵo neniu el la tri premioj estis aljuĝita, nur honora mencio. Temas pri dialogo inter Aida kaj ŝia amato Radames en malhela ejo, pri la egiptaj dioj Bes, Set kaj Ra kaj la diino Maat, kiujn ili alvokas. La pordoj kiujn la junuloj devas transpaŝi por iĝi eterne feliĉaj estas ankaŭ personigitaj. Do, estas tamen sufiĉe da rolantoj, kaj la prezidanto de la konkurs-juĝantaro, Humphrey Tonkin, rememorigas, ke en Esperanto-medio ne povas esti multe da rolantoj. Sed la teatraĵo tamen ŝajnas facile ludebla, ĝi estas sprita kaj refreŝigas la pramiton por nuntempa kompufon-uzanta publiko. Ĉi-lasto estas invitita partopreni, kiel infanoj ĉe ginjola prezentado, tio malpli plaĉis al mi. Sed jen amuza vidaĵo de la egipta mitologio kaj de la opero de Verdi, tuj antaŭ la jubilea jaro ĉar li naskiĝis en 1813.

La du eseoj rilatas al tre interesaj temoj, *Poezio en interreto – nova poezio?* Kaj *Morto ... kaj vivo en Amherst, Masaĉuseco*, fakte pri poetino kiu tie vivis en la 19a jarcento. Sed la lasta

parto de la unua, kiu finfine alfrontas la kernon de la temo, estas laŭ mi tro rapide pritraktita.

Ĉu komunaj punktoj inter tiuj verkoj? Konstateblas, ke diversaj kulturoj inspiris la verkintojn. *La Libro de la Mortintoj el Egiptujo* pri Aida kaj Radamès, ie Niki de Saint Phalle aperas siluete, kaj tio renovigas la temon pri perforto, male al tio, kio ne okazis en alia samtema verketo. Cetere, la dua eseo enkondukas nin ĉe la poetino Emily Dickinson en Amherst. En la alia eseo « altspirita portugala pastro Anchieta » vivinta en Brazilo estas elvokita. Pri tiuj du lastaj, famkonataj ne nur en siaj landoj, mi devis informiĝi en la reto, sed ĉu ne interalie pro tio ni ŝatas Esperanton, ĝi estas pordo al aliaj kulturoj?

La premiita infanlibro de la jaro estas *Padma, la eta dancistino*, de Tibor Sekelj, kiun mi ne ricevis. Mi provos akiri ĝin, ĉar Sekelj ja estas ŝatata de mi, kaj serbia korespondantino mia skribis, ke ŝi plezure legis ĝin por la Esperanto-Sumoo.

Tonkin bedaŭras pro la magra rikolto kaj la tajpaj kaj gramatikaj eraroj (ne aperantaj en la libreto kompreneble) sciigante, ke oni rajtas provlegigi sian manuskripton, se ne, tio signifas, ke oni estas tro memfida aŭ tro timida. Do, kuraĝon kaj provu mem verki kaj konkursi!

Sed bone respektu la konsilon « konklude, do, la devizoj de la venontjara konkurso estu 'Akuzativojn ne tro abundajn kaj ne tro avarajn (jes ja, Humphrey estas serĉemulo kiel Izenverdo\*, vi scias) – kaj en ĝusta loko', 'tajpu intence kaj intense', ekskursu en nia literaturo 'anstataŭ tordi la cerbojn de niaj eminentaj sed kompatindaj juĝantoj' ». Kaj li aldonas du paĝojn el Pirandello, *La laboro de verkisto*.

Anne JAUSIONS

\*Fabeloj de la verda pigo, Louis Beaucaire, TK/Stafeto, p. 30: « Kio mi manĝas? –Vi manĝas la akuzativon »

Muziko

# La Kompanoj, Plian **gigantan** paŝon al Lillo !



kun bongustaj manĝoj kaj agrablaj te- aŭ kaf-klacadoj...

Tiuj du tagoj estis decidaj pro pluraj kialoj. Unue ili konfirmis la konvikon de la instigintoj, ke indas vivi tiun projekton; due ke la elektita repertuaro estas kantebla kaj eĉ kunkantinda; trie ke tiaj kanzonostaĝoj estu programitaj dise tra Francio antaŭ la venontjara UK kaj poste, kial ne ankaŭ

**S**abaton 11an kaj dimanĉon 12an de oktobro pli ol tridek gekantantoj ĝuis unuan kanzonostaĝon kun La Kompanoj.

Naturamiko, lilla giganto, invitis esperantistojn ornamu lillan placon per kanzonbukedo okaze de la 100a UK en julio 2015. Prepare al tiu rendezuo, La Kompanoj proponas repertuaron de famaj francaj kanzonoj tradukitaj en esperanton. Nun estas elŝuteblaj la elektitaj tekstoj, partituroj kaj muzikoj. Tiel ĉiu ajn povos individue prepari sin al kunkantado. Tamen la vera celo restas grupe kunkanti. Tial atendente la rendezuon en Lillo, La Kompanoj animos unutagajn aŭ plurtagajn kanzonostaĝojn. La unua okazis semajnfine la 11an kaj 12an de oktobro en Artigo-ĉe-Bordozo. La datoj kaj lokoj de la ceteraj estas publikigitaj post konfirmoj.

Se FaMo kaj Marcelo Redulez dekomence impulsas la projekton, FaMo (denove li! sed li ja estas la ĉefa animanto!) kun sia akordiono kaj Bernardo Legeay kun sia suzafono estas la bazo de la muzikanta

skipo. Rapide al tiu duopo aliĝis ankaŭ Isabelle Diaz (piano kaj akordiono) kaj okaze de tiu staĝo Fransuazo Noaro' (violono) kaj Pjer Buvje' (gitaro kaj kontrabaso). Ni ne dubas, ke aliaj muzikantoj, eĉ muzikistoj, iam kunludos, ĉar jam esprimis sian emon Nikolin' (gurdo), Françoise Carrieu (diatona akordiono), eĉ Marita Kruijswijk kaj Marian Nesse, flutistino kaj akordionistino de Kapriol'! Sabaton matene, la muzikantoj agordis siajn instrumentajn partiturojn. Mirinde kiel ili profesinivele akompanis ĉiujn kanzonoprovojn dum la tuta semajnfino, kvankam unuan fojon ili kunmuzikis!

Plezure kunkanti - jen simpla feliĉo por amatoroj, kiaj estas La Kompanoj! Dum la semajnfino estis programitaj kvar provaĵoj, kiuj daŭris unu horon kaj duonon (du sabaton posttagmeze; unu dimanĉon matene kaj unu posttagmeze). Krome sabaton vespere du horojn daŭris la kunkantado ilustrita de arte preparitaj lumbildaroj.

Inter tiuj ĝojaj «labortempoj», malfermaj interŝanĝoj okazis dum bonvenaj paŭzoj

translime...

FaMo pretas animi laŭ invitoj de lokaj grupoj por minimume dekkvin partoprenantoj. Ankaŭ Marcelo venos, se li estos disponebla... sed kunkantantoj ne mankos, La Kompanoj tion asertas!

La 50-paĝa broŝuro kun la tekstoj kaj partituroj estas akirebla kontraŭ 5 €; plus sendokostoj se vi mendas ĝin ĉe Marcelo Redulez – chemin de l'Hortie – 33880 Cambes.

Pliaj informoj ĉe FaMo, fabricemorandeaudeau@gmail.com aŭ Marcelo marcel.redoulez@wanadoo.fr

Fabrice Morandeaudeau

Retejo : <http://lakompanoj.free.fr>

Sciencoj

## Monda Pupekspozicio

**Ĉ**ijare okazos de la 15a ĝis la 18a de oktobro en mia urbo, Higashikagawa, la 5-a Monda Pupekspozicio. En 2014 ni montris 1242 pupojn venintajn el 61 landoj. Tiu kolekto estas farita danke al la helpo de Esperantistoj tra la mondo. La pupoj, kiujn ni montras, portas tradiciajn vestaĵojn de la devenlandoj kaj estas ekspoziciataj en standoj kun informoj kaj fotoj pri la lando kaj la sendinto. Ĉiujare ĉiuj ambasadoj de la landoj reprezentataj estas petataj sendi turismajn informilojn por diskonigi pri la

kulturo kaj turismo en tiuj landoj.

Vi povas trovi informojn kaj fotojn pri la pasintaj ekspozicioj en nia hejmpaĝo <http://world-dolls-exhibition.org/>, kiu ekzistas ankaŭ en Esperanto.

La ĉi-jara ekspozicio estos dediĉita al Francio. Danke al la malavareco de parizaj e-istoj, gesinjoroj Lafargue, ni havos



plurajn francajn pupojn por montri. Por la kultura programo de la evento ni invitis JoMo-n por kanti kaj plie ni kunlaboras kun Alliance Française de najbara gubernio kaj la ambasado de Francio por la prezentado de francaj dancoj.



La eventon aŭspicias en 2015 UFE, EEU, UEA kaj la Franca Fervojista Esperanto-Asocio. Montri, ke Esperanto-organizo subtenas nian aranĝon helpas nin emfazi ĉe la amaskomunikiloj, ke Esperanto funkcias kiel kulturperilo.

Ankaŭ vi povas kontribui al la Monda Pupekspozicio per sendado de pupoj en tradiciaj vestaĵoj. Dum UK en Lille vi



povos transdoni vian donacon al S-ino Tomoko Kitani el Japanio, kiu portos la pupojn ĉi tien. Mi anticipe dankas pro via kontribuo!

Sciencaj verkaĵoj

## Karaj samideanoj !

**T**iom da aĵoj farendaj por Esperanto! Inter ili, ni disvolvu la sciencajn verkaĵojn. Pro tio, Esperantujo feliĉe havas du ĉefajn revuojn, t.e. la juna Teleskopo kaj la fama Scienca Revuo. Bedaŭrinde, jam dum jaroj, la fonto ŝajnas sekiĝanta. La fonto estas vi, esperantuloj, la verkantoj! Bedaŭrinde, en 2014, nur unu volumo de Scienca Revuo aperis kaj neniu el Teleskopo pro manko de artikoloj. Vikipedio disvolviĝas kaj tio bonegas sed ne sufiĉas, ĉar ĝi estas nur enciklopedio. Altkvalitaj sciencaj artikoloj

grave necesas en Esperantujo. Ili estu la altkvalita fonto de la vikipediaj artikoloj. Ankaŭ estas ili, kiuj esperantuje vivigas sciencojn.

Ne forgesu la esperantlingvajn revuojn! Se via labora fako estas teknika aŭ scienca (matematika, biologia, socia, historia, ktp), skribu pri ĝi en tiuj revuoj. Se vi konas fakulojn, la revuojn diskonigu al ili!

<http://www.teleskopo.com/eldonoj.htm>

<https://scienca-revuo.info/>

Anthony Lucas

Etsuo Miyoshi  
Swany Corp.  
981 Matsubara  
Higashikagawa-shi  
769-2795  
Japanio

Sciencoj

# Kulpulo en nia festejo, teatraĵo en Esperanto

**1** 20 spektantoj aplaudis la teatraĵon «Kulpulo en nia festejo» en la sudbretona urbo Vannes, la unuan de februaro 2015. Inter ili, pli ol duono da ne-esperantistoj!

Aktoro mortfalas sursceneje, kvazaŭ murdita rekte antaŭ la okuloj de la spektantoj. La murdo ne preĝeestas en la salono ... jes ja, sed ... KIE kaj KIU?

La klubo de Vannes (56) kaptis la okazon de sia Zamenhof-festo por prezenti tiun polican teatraĵon de 65 minutoj en du aktoj. Kvindek da esperantistoj el norda kaj centra bretonio, Rennes-regiono, Loire-Atlantique kaj kompreneble ĉirkaŭaĵoj de Vannes kuniĝis por bufeda tagmanĝo. Kaj posttagmeze, aldoniĝis sepdek da



pliaj partoprenantoj, invititoj de la klubanoj aŭ allogitaj de efika tamtamado en la lokaj amasinformiloj. Endas diri, ke la teatraĵo estis anoncita facile komprenebla dank'al komentoj en la franca lingvo, regule enŝovitaj kaj vigle ludataj de du

aktoroj antaŭ la scenejo.

La eniro estis senpage. Tamen monokolekto dum la interakto permeso al ni sendi

centon da eŭroj al Hori Jasuo por lia agado ĉe la lernantoj de Tooni, viktimoj de Fukushima.

Tiu teatraĵo rezultas de pedagogia ateliero en porprogresanta kurso. La origina franca verko *Le coupable est dans la salle* estas de bretona aŭtoro Yvon Taburet.



Li ĝoje konsentis pri traduko kaj adapto de sia teatraĵo kaj eĉ sendis kuraĝigan mesaĝon. Li skribis *Je ne pourrai être parmi vous le 1er février mais tous mes encouragements pour «Kulpulo en nia festejo» en espérant que cela divertira votre public. En ces temps troublés, nous avons plus que jamais besoin de rassemblement, de fraternité et d'universalité, des valeurs auxquelles, je crois, vous êtes attachés, tous les espérantistes.*

Tiu projekto ne estus realigebla sen la entuziasmo de 13 aktoroj, kiuj zorgeme trejniĝis dum pluraj monatoj (kaj tamen bone amuziĝis!) kaj de teknikistoj, kiuj ekzemple ne hezitis entrepreni produktadon de murŝranko, ŝtuparoj aŭ vera scenejokurteno.

Ilia plej bela rekompenco estis alveno de publiko multnombra!

Elisabeth Le Dru, respondeculo de la projekto

Literaturo

# Naskiĝis rezulto de konkurso de mallongaj filmoj “Teo kaj Amo”

**D**anke al la taksado de 7 membroj de la fina ĵurio, inkluzive de Mark Fettes, prezidanto de UEA, kaj Lee Jungkee, estrarano de UEA, naskiĝis la rezulto de la konkurso de mallongaj filmoj kun la temo “Teo kaj Amo”, t.e. tri specialaj premioj, 10 unuaj premioj (1 el Brazilo “La teo kiu venigas amantinon”), 12 duaj premioj kaj 20 triaj premioj.

Vidu detale ĉe <http://esperanto.cri.cn/1621/2015/02/06/165s172485.htm>. Invitite aŭtoroj de la filmoj de specialaj kaj unuaj premioj partoprenos senpage en premiodona ceremonio kaj filmfestivalo de Esperanto, kiuj okazos de la 16a ĝis la 23a de aprilo en la ĉina te-urbo Hangzhou. Tiam estos donataj atestiloj

kaj premi-donacoj al ĉiuj premiitoj, inkluzive de gajntoj de la premio «filmoto plej ŝatata de retanoj». Nun por la premio ankoraŭ funkcias la interreta voĉdonado.

Ankaŭ voĉdonantoj havos ŝancon gajni donaceton riĉe karakterizatan per ĉina kulturo.

La voĉdona regularo kaj paĝo ĉe <http://esperanto.cri.cn/filme/14tea3.htm>.

Komence de aprilo videblos la paĝo por la filmfestivalo ĉe <http://esperanto.cri.cn/filme/>.

Nun la organiz-teamo preparas la

filmfestivalon kaj volas, ke ĝi estos profesia, interesa, amuza kaj neforgesebla.

Tial estas bonvenaj ĉiuj proponoj!

Bonvolu sendi viajn proponojn al [filmkonkurso2014@163.com](mailto:filmkonkurso2014@163.com), dankegon.

La konkurso de mallongaj filmoj “Teo kaj Amo” kaj la Filmo-Festivalo estos aŭspiciataj de UEA, Esperantoredakcio de Ĉina Radio Internacia kaj pluraj ĉinaj instancoj. Dum sia irado, ĝi gajnis fortan subtenadon kaj helpadon de ligoj kaj asocioj de Esperanto kaj diverslandaj samideanoj.

Ĝoĵa (Zhang Ping)





## La Treko de la Reĝinoj!



«Ĉ iam pli alten, ĉiam pli bele! » sed la kvar sepdekjarulinoj kiuj flugis al Nepalo komence de oktobro 2014 havis alian celon, « vidi la montojn de for kaj la homojn de proksime ». Nia ĉiĉerono, Gelbu, venis al Francio en januaro por perfektigi sian konon de la franca lingvo, por renkonti vojaĝontojn kaj plani la restadon laŭ iliaj deziroj. Tiel ni decidis resti nur unu tagon en Katmanduo kaj tuj flugi al Pokhara por piedvagadi en la ĉirkaŭaĵo de tiu belega urbo, vidalvide al la Anapurna montaro. Per buseto ni supreniris al fora vilaĝeto Bhumdi. Elektro estis instalita tie nur en 2014, ĝi ne estis en nia ĉambro sed en la koridoro kaj nokte ni devis eliri por viziti necesejon instalitan speciale por ni post nia alveno. Bonŝance, kiam ni alvenis estis festo, la junuloj de la diversaj vilaĝoj ludis retpilkon. La vilaĝanoj multnombre venis

por kuraĝigi ilin kaj forte aplaudis ! Belege estis vestitaj la virinoj. Ili surloke kuiris, vendis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Estis amikeca etoso en belega kampara ĉirkaŭaĵo. En niaj pakaĵoj ni kunportis vestaĵojn por infanoj, do ni informis respondeculon. Li proponis al deko da virinoj viziti nian loĝejon je la fino de la festo. Patrinoj venis, ofte kun bebo sur la brakoj, kaj estis same kiel en bazaro. Ili elektis taŭgajn vestaĵojn por siaj infanoj kaj foriris tre feliĉaj.

### Por bone vidi la montojn oni devas frue ellitiĝi

Por bone vidi la montojn oni devas frue ellitiĝi, tiam la suno bone lumigas la pintojn kaj ni parkerigis la nomojn... Anapurna I, II, III, Anapurna IV, Anapurna Suda, Maĉapuĉare pli fronte, Manaslu pli for... Iam mi diris al Gelbu, ke tiu monto memorigas al mi similan ĉe ni kaj

mi komencis diri « le Dôme »... kaj tuj li aldonis... « des Écrins » ! Estis surprizo kaj ĝojo, ambaŭ el ni povis rakonti pri surgrimado de ĝi. Piedirante ni vidis multajn rizkampojn, trairis multajn vilaĝetojn, salutis gelernantojn survoje al lernejo, vizitis la Templon de la Paco konstruitan de japanoj, trairis belegan arbaron, gustumis lokajn frandaĵojn. Sub varma suno ni malrapide paŝis, ni estis ekster la mondo, ekster la tagaj zorgoj... Gravas nur antaŭen iri ! Kial la Treko de la Reĝinoj ? Ĉu nur aludo al la Reĝa Treko1 ? Imagu, nia grupo havis kuiriston kiu bonege kuiris por ke ne manku al ni la fortoj por piedvagadi. Dum la tuta restado mi opinias, ke ni tre bone manĝis, tre sane. Surloke estis aĉetata la nutraĵo. Krom la kuiristo estis du portistoj, junaj kaj fortaj kaj nia mirinda ĉiĉerono, ĉiam preta helpi al ni de frumatene ĝis vespere.

Mi mallongigis mian piedmigradon por reiri al Katmanduo kaj viziti esperantistojn. Ĉe la flughaveno atendis min Esploristo, junulo kiu iĝis mia ĉiĉerono. Ni tuj vizitis la prezidantaron de la nepala grupo, Indu Devi Thapalya, kaj mi havis la honoron tranokti en la « Esperanto-ĉambro » kie jam tranoktis famaj esperantistoj. Poste, ni iris al la sidejo. Tie, mi aŭskultis prelegon pri politiko en Nepalo - tiom da diversaj partioj kaj daŭre estas problemoj por regi la landon. Estis multaj partoprenantoj kaj mi ĝojis konatiĝi kun ili - kaj revidi la konatojn. La postan tagon mi prelegis pri nuntempaj virinoj kiuj famiĝis en Esperantujo je diversaj kampoj kaj kun kiuj mi persone konatiĝis, Marjorie Boulton, Katalin Faragó, Zsófia Kóródy, Kristin Tytgat, Claude Nourmont, Katalin Kováts, Anna Lowenstein, Franciska Toubale, Mirejo Grosjean, Spomenka Štimec, Barbara Pietrzak, Ilona Koutny, Renée Triolle. Tion, kion mi ne antaŭvidis, estas ke partoprenis pli ol 30 viroj kaj nur 3 virinoj ! Ĉu bone elektita temo ? Estis interesaj reagoj, unu partoprenanto demandis al mi kial mi elektis tiun temon !

### Iom post iom mi malstreĉiĝis sed longa estis la vojo



Noktiĝis kaj iu esperantisto demandis al mi « ĉu vi pretas motorciklo por reiri al la domo de Indu? » Mi tute ne pensis pri la terura trafiko, mi rigardis la motorciklon, mi kapablas grimpi sur ĝin do mi simple jesis. Je la komenco mi forte premis la dorson de la ŝoforo kaj iom post iom mi malstreĉiĝis sed longa estis la vojo, malvarma la vespero kaj multnombraj la aŭtomobiloj, la motorcikloj, la biciklantoj, la piedirantoj, malkomforta la vojo. Kia aventuro !

Antaŭ ol vojaĝi al Nepalo mi rilatis kun M.S. Shany, esperantisto kiu invitis min viziti 2 lernejojn kie li instruas esperanton.

Per DVD mi montris mian regionon - la Sudajn Alpojn - kaj tuj gelemantoj rimarkis similecojn kun partoj de Nepalo. Ĉiam estas plezuro interŝanĝi kun junuloj kaj mi forte kuraĝigis ilin plulerni la internacian lingvon kaj kore invitis ilin viziti la 100an UK en Lillo 2015 !

Ankaŭ vin, kara leganto, mi invitas iri al Lillo kaj espereble vi konatiĝos kun la entuziasmaj nepalaj junuloj !

Monique Arnaud

